
Perkomputora Termino-Kolekto (Terminoteko)

Bernhard Pabst
D-53773 Hennef

Südweg 42
Germanujo

Cirkulero n-ro 4, stato «93-10-16»

Kiel printi Pekoteko-registraĵojn sen Letrikso?

Precipa malavantaĝo de Letrikso estas, ke ĝi funkcias nur kun kelkaj malmultaj 9-pinglaj printatoroj, sed ekz-e ne kun modernaj 24-pinglaj printatoroj. Tamen eĉ sen Letrikso, sole per la kapabloj de *WordPerfect* 4.2 (Vopo) eblas produkti sufiĉe kontentigajn (tamen ne perfektajn) printaĵojn, kiuj estas tre similaj al tiuj fareblaj per Letrikso.

La en tiu ĉapitro prezentitajn solvojn mi funkciigis por la 24-pingla printatoro EPSON LQ-500 (softve identa kun EPSON LQ-2500) en kombino kun la tekst-programoj Vopo 4.2 kaj *Word* 4.0 (Germanaj versioj). Unue ni rigardu kelkajn solvojn, kiuj uzas nur *WordPerfect*, poste kelkajn por *Word*.

A. Print-solvoj sole per Vopo sen Letrikso

I. Diakritaj literoj kaj specialaj signoj

Unue ni rigardos al simpla solvo, kiu metas specialajn ordonojn kaj karakterojn en la teksto mem kaj do ŝanĝas ĝin. Poste ni traktos pli elegantan solvon, kiu baziĝas sur ŝanĝo de la printatora karaktero-tabelo (vd. pkt-o 2.)

1. Solvo per ŝanĝo de la originala Vopo-teksto

a) literoj kun cirkumflekso (ASCII 94)

La "ĉapelitajn" Esperanto-literojn «ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ » (pri «ŭ» vd. malsupre) oni plej facile povas produkti per la karaktero-surprinto-funkcio (karaktero-kombino-funkcio) de Vopo, <SHFT-F1, 3>. Ekz-e por «ĉ» do necesas la klavo-intersekvo «c <SHFT-F1, 3> ^». Vopo per la karaktero-kombino-funkcio ordonas al la printatoro retropaŝon (ASCII 8). Tamen ĝi interne kalkulas la tri signalojn «litero-retropaŝo-diakrito» kiel nur unu signalon, tiel ke ekzistas neniu problemo pri blokoj aŭ glataj dekstraj margenoj.

Tiu solvo tamen havas du gravajn malavantaĝojn:

- klavi la nomitan intersekvon daŭras longe;
- sur la ekrano aperas nur la surprintota karaktero, ĉe la ĉapelitaj literoj do nur «^», sed ne la baza litero, do ekz-e ne «c». Tio malfaciligas la legadon kaj kontroladon de teksto.

Pro tio oni prefere do skribu tekston uzante la kutimajn karakterojn proponitajn en la Pekoteko-regularo kaj antaŭ printado transformu la registraĵon al print-registraĵo (ekz-e aldonante al la dosiernomo la etendiĝon *.prt). Tio estas rapide farebla per jena makroo:

1. Iru al la komenco de la dosiero
2. Serĉu-kaj-anstataŭigu «ĉ» per «c[Kombino]^»
3. Iru al la komenco de la dosiero
4. Serĉu-kaj-anstataŭigu « ĝ » per «g[Kombino]^»
5. Iru al la komenco de la dosiero

6. ktp.

La necesa klavo-intersekvo de tiu makroo estas:

0. <CTRL-F10>: makro-nomo (ekz-e "diakkonv.mac") <ENIG>
1. <Home><Home><sago-supren>
2. <ALT-F2, n,><ê><c><SHFT-F1, 3><^><F2>
3. <Home><Home><sago-supren>
4. <ALT-F2, n,>< ><g><SHFT-F1, 3><^><F2>
5. <Home><Home><sago-supren>
6. ktp.

Tiu solvo eblas ne nur por la Esperantaj literoj kun cirkumfleko, sed por ĉiuj "ĉapelitaj" literoj (â, ĉ, ĉ, ô, î). Multaj tamen jam ekzistas en la ASCII-kodaĵo.

b) literoj kun tildo (ASCII 126), akuto (ASCII 39), malakuto (ASCII 96) cirkleto (ASCII 248), du-akuto (citilo ASCII 34), cedilo (komo ASCII 44) kaj trastreko (oblikva streko ASCII 47)

Same tiel eblas ĝusta printado de literoj havantaj tildon (, ŝ,), akuton (á, é, ktp.), malakuton (ř, č, ktp.), cirkleton (ekz-e â), du-akuton (,), cedilon (ç, ĉ, Ĝ) aŭ trastrekon (ŧ, Ł), ĉar tiuj super- aŭ subsignoj enestas en la norma ASCII-kodaĵo.

Du-akutoj necesas por la Hungaraj «o» kaj «u». Simpla kombino de citilo (ASCII 34) kun «o» aŭ «u» laŭ la menciita metodo tamen ne kontentigis min, ĉar la streketoj estu iom oblikvaj kaj inter ili kaj la baza «o» aŭ «u» estu spaceto. Pro tio mi "kreis" ilin per jena kombino: «baza litero-[kombino]-[supra skribo]-[kursiva]-». La Vopo-ordono por tio estas:

«o<SHFT-F1, 3><SHFT-F1, 1><CTRL-F8, A><<27>4><"> <CTRL-F8, A><<27>5>».

<SHFT-F1, 3> estas la kutima kombino-ordono, <SHFT-F1, 1> printas la

sekvantan karakteron, do la «"», per superskribo. Per tio ĝi ŝoviĝas iom al la supra rando kaj la dezirata spaceto inter la baza litero kaj la du-akuto ekestas. Per <CTRL-F8, A> Vopo permesas enmeti printatoran reg-signalon. Tie ĉi mi enmetis la signalon, kiu je mia printatoro, EPSON LQ-500, ŝaltas al kursiva skribo: «<27>4» (tio estas «ESC 4»). Kiun signalon via printatoro bezonas, vi ekscias el ĝia man-libro, kie devus trovi i listo kun ĉiuj ordonoj. Poste sekvas la printenda karaktero, nome «"». Per la kursiva skribo ĝi ĝuste fariĝas iom oblikva. Fine sekvas ordono por denove malŝalti la kursivan skribon, je mia printatoro «ESC 5» aŭ «<27>5». Superskribon oni ne devas malŝalti, Vopo faras tion aŭtomate. Per tio la «"» do printiĝas kursive kaj per superskribo kaj fine precize super la «o» aŭ «u».

Por la cedilo ĉe «» kaj «» mi uzis la komon (ASCII 44). Per «t-[kombino]-[malsupra skribo]-[grasa]-» mi atingis la plej bonan print-bildon per mia preferata, "kunpremita" kaj pro tio spacon ŝparanta skribo, per kiu ankaŭ tiu ĉi teksto estas skribita.

Per tiuj kombinoj do eblas ĝuste printi grandan nombron de diakritaj literoj kaj pro tio de lingvoj, sen ke oni bezonus iun helpan programon kiel Letrikson.

c) literoj kun du-korno, precipe Esperanta «ŭ», aŭ brevo

Problemo tamen estas pri ĉiuj literoj kun hoketoj (du-korno aŭ brevo), ĉar tiuj diakritoj mankas en la norma ASCII-kodaĵo. Tiun problemon mi ne ankoraŭ plene kontentige solvis. Post ioma eksperimentado mi provizore uzas por la Esperanta «u» kun hoketo la kombinon «u[kombino]», kiu je mia printatoro donas akcepteblan rezulton. Simile estas printebla la Ĉeĥa «ř» kun hoketo, kiun mi ĝis nun tamen apenaŭ bezonis.

Kiun ne kontentigas tiu relative facila solvo, tiu eksperimentu per kombinoj kun «v» aŭ kombino de la du akcentoj

«^l» kaj «[^]» aŭ per «^l». La minuskla «v» estas iom tro granda kiel supersigno, kompare al la antaŭfarita «[^]» ktp. Uzante la superskribo-funkcion de Vopo oni povas ĝin malgrandigi je du trionoj de ĝia origina grandeco (same ĉe la subskribo-funkcio). Sed en superskribo ĝia pozicio ne estis korekta, kiam mi uzis la skribon, per kiu tiu artikolo estas skribita. Necesis meti ĝin pli alten ol per superskribo eblis. Nu, Vopo por tio havas la funkciojn <SHIFT-F1, 4 kaj 5>. Tiel mi fine eltrovis jenan solvon: «r[kombino][subskribo][duona-linio-alten]v[duona-linio-malalten]», farebla per: «r» <SHIFT-F1, 3> <SHIFT-F1, 2> <SHIFT-F1, 4> «v» <SHIFT-F1, 5>. Kaj jen la rezulto «ř» aŭ laŭ la sama metodo por aliaj diakritoj «č», «ě», «ň», ktp. Perfektaj la literoj ne estas, ĉar ankoraŭ la "hoketo" estas tro granda, sed eble tamen akcepteblaj por la gusto de kelkaj.

Tria (neprekta) solvo por tiuj literoj estas kombino de «r» kun tremao «^l». En la norma, t.e. Usona, ASCII-kodo ĝi ne estas antaŭdefinita, sed ĝi ekzistas ekz-e en la Franca versio, kie ĝi okupas la (decimalan) pozicion ASCII-126 (= en la Usona kodo «~»). Mi do nur devas ordoni al mia printatoro "salti" al la Franca ASCII, printi la cititan pozicion kaj "resalti" al la Usona (aŭ Germana, ktp.). Tiun ordonon mi denove povas enigi per «CTRL-F8, A». Vopo per la vorto «ordono:» postulas enigon de la printatora ordono. Por EPSON LQ-500 ĝi estas «<27>R<1>~<27>R<0>» (vd. vian printatoran manlibron). «<27>R», laŭ alia not-maniero «ESC R», estas la ordono, kiu ekaktivigas internacian karakteron. La posta «<1>» simbolas la Francan, «<0>» la Usonan karakteron, ktp. Per «<27>R<1>» mi do altas al la Franca karaktero, printas ASCII-126 per «~» kaj reŝaltas al la Usona per «<27>R<0>». Nun nur necesas kombini tion kun «r» (aŭ «c», «z» ktp.) laŭ la jam bone konata metodo, kaj jen ni havas la plej

diversajn literojn kun tremao, krom la "rutinaj" «ä», «ë», «d'», «ö», «ü», ekz-e do «c», «s», «z».

Eksperimentu per la skriboj de via printatoro por eltrovi, kiu solvo por la mankanta hoketo plej multe kontentigas vin.

Parenteze mi fine diru, ke per la metodo ŝalti al alia nacia karaktraro eblas facile printi unu plian antaŭpreparitan simbolon, nome «^l». Ĝi troviĝas ekz-e en la Sveda karaktraro je «\$» (= ASCII-36). Ĉar la Sveda karaktraro havas la ordo-numeron «5», la simbolo estas "atingebla" per «<27>R<5>\$<27>R<0>». Ĉiuj aliaj simboloj estas identaj kun la Usona karaktraro, nur iliaj pozicioj iom varias.

ĉ) aliaj literoj kaj simboloj

La sageton (→) mi akcepteble kreas per «>[kombino]-». Tildo tamen tute ne estas havebla per la simplaj kapabloj de la kombino-funkcio. Mi provizore devas akcepti la simbolon "dupunkto kun vertikala streko" (÷) por ĝi. Aliaj karakteroj, pri kiu mi ankoraŭ devas rezigni, estas ekz-e la Turka senpunkta «i», la Franca kuntrenita «oe» («ć» tamen ekzistas en ASCII 145) kaj eble kelkaj aliaj, kiujn mi ĝis nun neniam bezonis kaj pri kiuj mi ankoraŭ ne eksperimentis.

d) konklude

Eblas do konstati, ke sole per Vopo kaj sen Letrikso mi kapablas bone printi ĉiujn de mi bezonatajn literojn kaj simbolojn escepte de tildo kaj Franca kuntrenita «oe»; nur malpli bone, tamen laŭ mi ankoraŭ akcepteble mi povas printi literojn kun du-korno, speciale la Esperantan «ŭ».

2. Solvo per ŝanĝo de la printatora karaktero-tabelo

Malavantaĝo tamen estas, ke iuj kombinoj kongruas bone nur kun certa skribo. Ekz-e uzante la EPSON-skribon

«2», t.e. "kuntrenita" Roman, kun piĉo «13» estis pli bone enigi spaceton per superskribo je « » kiel ĵus priskribite; por la senserifa skribo «3» kun piĉo «15» (mikro-skribo) tamen estas pli bone ne krei spaceton, ĉar la meza skribo-bendo jam estas malpli alta kaj la spaco pro tio jam aŭtomate ekzistas. Male, kun la aldona spaco la du-akuto malagrabla ie "fore" ŝvebas super la «o». Eniginte la ordonon de superskribo mi pro tio nur plu povas uzi la unuan skribon kun bona rezulto. Tio iom limigas la liberan elekton de skriboj aŭ necesigas antaŭe rekonverti la tutan tekston al la "bezonoj" de alia skribo. Por solvi tiun malagrablaĵon kaj por ke mi ne ĉiam devus ŝanĝi la originalan Pekoteko-tekston, mi ŝanĝis la printatoran karaktero-tabelon, do la dosieron WPFONT.FIL.

Per kun Vopo liverita speciala programo PRINTER.PRГ tio estas pli facile ol ŝajnas en la unua momento kaj oni ne devas timi ĝin. Tamen por eviti ĉiujn riskojn, unue **faru kopion** de la originala WPFONT.FIL sur diskedo. Poste printigu la informan dosieron kiu priskribas, kiel PRINTER.PRГ funkcias kaj legu ĝin. La dosiero troviĝas sur via Vopodiskedo "printatoro".

Nun vi povas komenci, startigante PRINTER.PRГ. Elektu punkton 4 de la ĉefa menuo, «ŝanĝo de la karaktero-tabelo». Aperas submenuo, el kiu vi elektu punkton «B», «prilaboro de la karaktero-tabelo». Post konfirmo per «enig» la programo fine montras la karaktero-tabelon kun ĉiuj ASCII-pozicioj kaj informo pri tio, kiun signalon la komputero sendas al la printatoro, kiam ĝi "ricevas" certan karakteron. Tiun tabelon vi nun ŝanĝas laŭ viaj bezonoj. Ekz-e ekklavu «155» kaj la programo aŭtomate saltas al la ASCII-pozicio 155 (cendosimbolo). Post klavo de <A> en la malgranda menuo sub la tabelo vi povas forviŝi la cendo-simbolon kaj anstataŭe enmeti la supre priskritan intersekvon «c

[kombino] ^». Vi devas enigi ĝin jene: «c<8>^». Simile vi enmetas ĉiujn aliajn intersekvojn, kiujn vi eltrovis laŭ la maniero priskribita sub 1. Se vi finis, forlasu PRINTER.PRГ kiel la diversaj menuoj priskribas. PRINTER.PRГ dume aŭtomate ŝanĝas la dosieron WPFONT.FIL al la novaj difinoj. Ek de nun ĉiam, kiam sur via ekrano aperas cendo-simbolo, printiĝas «ĉ», sen ke necesus ŝanĝi la tekston mem. Kompreneble la cendo-simbolon mem vi nun per la ŝanĝita karaktero-tabelo ne plu povas printi. Por tio vi unue devus rekopii la originalan WPFONT.FIL en la Vopodirektorion. Ĉe mi tio ne ĝenas, ĉar mi neniam bezonis la cendo-simbolon.

Mia ŝanĝita karaktero-tabelo nun liveras jenajn printaĵojn (la maloftajn hoketo-literojn mi ne enigis):

	0		1	
	0	1	2	3
	4	5	6	7
	8	9	0	1
	2	3	4	5
	6	7	8	9
000				
020	¶	§		
		!	"	#
	\$	%	&	'
040	()	*	+
	,	-	.	/
	0	1	2	3
	4	5	6	7
	8	9	:	;

060	<	=	>	?
	@	A	B	C
	D	E	F	G
	H	I	J	K
	L	M	N	O
080	P	Q	R	S
	T	U	V	W
	X	Y	Z	[
	\] ^	_	^
	`	a	b	c
100	d	e	f	g
	h	i	j	k
	l	m	n	o
	p	q	r	s
	t	u	v	w
120	x	y	z	{
		}	~	1
	Ç	ü	é	â
	ä	í	Í	ç
	ę	ë	č	ď
140	ĵ	ě	Ä	Ĺ
	Ě	ć	Č	ô
	ö	ň	ů	ű
		Ö	Ü	č
	Ł	Ą		
160	á	í	ó	ú
	ń	Ń	Ş	ş
	ž	˘	˘	˘
	Ł	˘	«	»

	β			
		μ		
240	±		÷	
	(fino)	˘		
	0	1	2	3
	4	5	6	7
	8	9	0	1
	2	3	4	5
	6	7	8	9
	0			

Fine ankoraŭ kelkaj el miaj provoj:

o" u" ü " " ö " ú
r c z

II. Specialaj print-efikoj

Pekoteko pro Letrikso uzas jenajn printatorajn reg-signalojn, kiujn eblas anstataŭigi per simplaj Vopo-signaloj:

- \J..j = altu/mal altu blok-funkcion = <CTRL-F8, 3/4>
- \I..i = altu/mal altu kursivan skribon =
 1. <CTRL-F8, A><la reg-signal de via printatoro por kursiva skribo, ekz-e <27>4 / <27>5 >, vd. supre; aŭ
 2. <CTRL-F8, 1><la cifero de kursiva skribo de via printatoro>
- \W..w = altu/mal altu lar an skribon = <CTRL-F8, A><la reg-signal de via printatoro por lar a skribo, ekz-e <27>14 / <27>20 >, vd. supre;

Ankaŭ tiucele do ne nepre necesas Letrikso, t.e. ankaŭ per 24-pingla printatoro vi povas kontentige printi Pekotekodossierojn.

B. Print-solvoj per Word

1. Diakritaj literoj kaj specialaj signoj

La Esperantaj diakritaj literoj vi povas produkti per la intersekvo "c-ASCII 8-^". ASCII 8 ordonas al la printatoro "retro-paŝu", tiel ke la "ĉapelo" sidas ĝuste super "c", "g" ktp. Atentu ke tio tamen nur funkcias ĉe ne-proporcia skribo, do skribo kun ne-varia larĝeco de la literoj, ĉar ankaŭ la retro-paŝo estas ĉiam sama. Atentu krome, ke aŭtomata glata dekstra marĝeno ne plu funkcias, ĉar tri signoj sur la ekrano produktas nur unu signon sur la papero.

2. Por produkti la larĝajn Pekoteko-numerojn anstataŭigu la originalan "\W" per ASCII 14 (premu la ALT-klavon kaj samtempe <1>, poste <4> sur la cifera bloko, do ne sur la ciferoj super la literoj). Se vi anstataŭigas la \W-kodaĵon per la "anstataŭigu"-komando de via tekst-programo, atentu, ke vi ŝaltas al reĝimo en kiu la programo distingas inter "\W" kaj "\w", alikaze vi enmetus dufoje, kaj antaŭ kaj post la Pekoteko-numero, la signalon ASCII 14. Ĝi ordonas al la printatoro "printu la sekvantan linion per duobla larĝeco", t.e. unu simbolo (litero ktp.) ricevu la spaccon de du simboloj en la normala modo.

Por nuligi la larĝan printadon vi devas enmeti ASCII 20. Ordonu do: "anstataŭigu \w\---- per ASCII 20".

Same vi povas produkti ankaŭ mallarĝan printadon (kiun ni tamen ne bezonas por Pekoteko). La respektivaj ASCII-kodaĵoj estas 15 (printu mallarĝe) kaj 18 (printu normale).

3. Kiel reformatigi Pekotekon-dosieron post transigo al alia tekstprogramo?

Se vi ne povas uzi Vopon, vi petu

alsendon de la Pekoteko registraĵoj en la "ĝenerala tekstprilabora formato". Vopo 4.2 produktas ĝin per <Ctrl-F5><6>. Tio gardas i.a. la tabojn, kiuj per transformigo en "pura ASCII-kodaĵoj" (Vopo 4.2-ordono <Ctrl-F5><1>) fariĝus aro da spacetoj [ASCII 32]).

Laŭ ambaŭ transformoj vi tamen perdas la grasan skribon. Tion vi povas rehavi jene:

a) Facile tio eblas por la ĉiam sam-ampleksaj "Fon:" kaj "Rim:". Kreu makroon kiu ordonas: Serĉu "Fon:" - grasigu ĝin. Same por "Rim:"

b) Pli malfacile tio estas por la grasaj Esperanto-terminoj, ĉar ili havas tute malsamajn longecojn, strukturojn ktp. Bonan "regrasigon" vi produktas, se via tekstprogramo kapablas serĉi simile kiel Vopo. Tiukaze kreu makroon kun jena ordon-intersekvo:

Serĉu {Eo1}TAB - ŝaltu la blok-funkcion - serĉu spaceto-*a - malŝaltu la blok-funkcion - grasigu. Problemo tamen restas {Eo2} ktp., ĉar por ili vi ne plu povas serĉi je "*a" kiel fino de la bloko.

Kontentigajn (tamen ne perfektajn rezultojn) vi ankaŭ ricevas, se via programo, kiel ekz. WORD, ne kapablas blokigi en la ĵus priskribita maniero. Tiukaze apliku jenan metodon: "Serĉu {Eo?}TAB" [la demandosigno reprezentas iun alian karaktron, do {Eo2}, {Eo3} ktp.] - "blokigu ĝis la linio-fino" - "malgrandigu la blokon je n-foja retro-paŝo" - "grasigu la blokon". Kiom da retro-paŝoj vi devas malgrandigi la blokon dependas de la nombro da karakteroj inter la Esperanto-termino kaj la linio fino. Ĝi povas esti malsama, ekz. se post la termino staras ne nur "*a" sed pliaj fontindikoj, ekz. "*a *b *c". Tiam la rezulto estas malĝusta kaj vi devas "mane" korekti ĝin. Same okazas, se oni malunuece uzis spacetojn inter termino-fino aŭ fontindikoj kaj la kampo-limigilo "^R", do se oni foje tajpis "Esperanto *a^R", foje "Esperanto *a

^R". Tamen por la plej granda parto de la terminoj la "regrasigo" post transigo al alia tekstprogramo tiel aŭtomate funkcias.

Se vi trovis aliajn, pli favorajn solvojn, aŭ frontas iujn problemojn, bv. skribi, laŭeble precize indikante la maŝinaron kaj la programon ("hardvon" kaj "softvon"), kiun vi uzas.

Enhave senŝanĝa represo de la eldono Oktobro 1993.

Ne ĉiujn specialajn simbolojn kaj diakritajn literojn menciitajn mi sukcesis rekrei per mia nuna tute alia maŝinaro kaj programoj (precipe - sed ne nur - la tabelo sur paĝoj 4 kaj 5 estas fuŝita). Ĉar la teksto ja ĉiukaze hodiaŭ havas nur historian valoron, ĉar nek la softvo nek la hardvo nuntempe ankoraŭ estas uzataj, mi rezignis pri longaj provoj reprodukti ĉion. Mi prezentas la represon de tiu ĉi cirkulero nur por ekhavi kompletan de la Terminoteko-serio kaj redoni ian ideon pri la siatempaj streboj, klopodoj kaj (laŭ hodiaŭaj standardoj – primitivaj) metodoj.

La indikata kontakt-adreso ne plu validas. Kontaktu nun:

Bernhard.Pabst[ĉe]gmx.de
(anstataŭigu [ĉe] per @).

© Bernhard Pabst, 08.2006
